

KONTAKTO

ISSN 0023-3692

numero 218 (2007:2)

LIBERO



BIG ARMY OF IMMIGRANTS

Nine Ships Bring 12,600 Immigrants from Europe

Ellis Island Officials
the Day—Sixty
These Bo

No fewer than 12,600 immigrants
in this port yesterday
in one day recorded in
immigration service.
opened for business
in the harbor and were
from seven ships with
passengers. The remain
with about 3,000 of
had to wait until
prove their eligi
roll.
The names
great herd

United States Immigration
ELLIS ISLAND, NEW YORK

DETENTION CARD

CRUSE OF DETENTION

THE IMMIGRANTS



Saluton!

Mi volus malfermi tiun ĉi enkondukon per Artikolo 13 el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: "1. Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato; 2. Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon". Ĉi tiu artikolo tre kongruas kun la ĉeftemo de tiu ĉi numero: Libero. La vorto "Libero" havas multajn aspektojn – ĉi tie ni

ne parolos pri politika, ekonomia libero aŭ pri filozofia demando pri libero. Ni ĉefe parolos pri persona libero kaj ankaŭ libero (aŭ mallibero) moviĝi.

Malfermas tiun ĉi numeron artikolo de esperantisto, kies nomo, plej verŝajne, estas bone konata al vi: jOmO! Jean-Marc Leclercq (jOmO) estas ne nur bonega muzikisto, poligloto kaj anarkiisto: li estas ankaŭ talenta verkisto. jOmO aŭtoras libron pri Nestor Maĥno – fama anarkiisto el Ukrainio. Legu liajn impresojn pri la vizito al la patrujo de Maĥno (p. 3-5).

En la sekva artikolo profesoro pri psikologio Rubén Feldman González rakontas pri la longa kaj malfeliĉa landlimo inter Usono kaj Meksiko (p. 6). La sekva artikolo (de Mar Kardenas-Loutzenhaiser) estas pri la sama temo kaj ankaŭ pri la longa debato pri enmigrado en Usonon (p. 7). Por pli profunde kovri ĉi tiun temon, ni demandis kelkajn esperantistojn, loĝantajn en Usono, pri iliaj opinioj rilate enmigradon (p. 10).

Pasintjare mi bonŝancis esti en Novjorko, kaj la vizito al la muzeo de enmigrado sur la insulo Ellis estis unu el la plej interesaj kaj neforgeseblaj spertoj. Nun estas mia plezuro dividi miajn spertojn kun ĉiuj legantoj de *KONTAKTO* (p. 8-9).

Multaj esperantistoj tre bone konas Kreivan Komunumon – la organizaĵon, kiu strebas senpage kaj laŭleĝe disponigi al la publiko diversajn verkojn. Artikolo de Yves Nevelsteen rakontas pli detale pri ĝi (p. 10)!

La retpaĝaro "Amikumu" estas tre neordinara retejo: ĝi populariĝis eĉ antaŭ sia oficiala lanĉo! Legu pli pri "Amikumu" en la artikolo de Chuck Smith kaj Judith Meyer (p. 10).

En la artikolo "Libero de elekto" Konstantin Aleksandrov rakontas pri "La Nova Homaro" – nekomerca scienc-kleriga projekto, kiu strebas al la plibonigo de la mondo en ĉiuj sferoj. Legu pli pri tio – kaj legu ankaŭ artikolon el la revuo "Nova Homaro", kiun Konstantin tradukis en Esperanton (p. 11).

En la artikolo "Limigo de libereco: ĉu nun ankaŭ fare de liberemuloj?" Martin Lavallée montras, kiel unu grupo de unu el la plej liberemulaj religioj provas "kopirajtiĝi" sian nomon kaj malpermesi la uzadon de ĝi al ĉiuj aliaj grupoj de tiu ĉi religio.

En la artikolo "Por ĉiu irakano, kiu mortas per bomboj, naskiĝas kelkoblo da teroristoj" (p. 15) Etsuo Miyoshi, kompaniestro kaj Esperanto-mecenato, dividas siajn pensojn pri kelkaj el la plej gravaj problemoj de la mondo. Krome, en tiu ĉi numero atendas vin rencozo pri la nova disko "Martin kaj talpoj", la rubriko "Anguleto" kaj la facila vortolisto de *KONTAKTO*.

Agrablan legadon, karaj legantoj kaj aŭtoroj – kaj dankon pro via kunlaboro! Ni tre bezonas viajn artikolojn – kontribuu!

Jenja

Temoj de *KONTAKTO* en 2007

2007:3. PARANORMALAĴOJ/MISTEROJ DE LA MONDO.

2007:4. KUNE – POR PLI BONA MONDO.

La temoj de la sekvaj numeroj ankoraŭ ne estas deciditaj. Proponu *vian* temon! Ĉiuj viaj artikoloj, ideoj, konsiloj, rimarkoj estas pli ol bonvenegaj kaj tre bezonataj! Kontakto la redakcion laŭ la adreso: *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>.

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 218** (2007:2), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>. **Eldonanto** (administrato, abonoj, anoncoj): **UEA:** ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro, grafikisto:** Eugenia AMIS (Ukrainio/Usono). **Vic-redaktoroj:** Joel AMIS (Usono) kaj Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio). **Ĉef-korektisto:** Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudeffroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko, (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujare. **Anoncarifoj:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondokuponon por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano* (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22.00/21/13 715; <http://216.138.240.229/rc4> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

<ENHAVO>

Liberecana vojaĝo al liberecana centro (Jean-Marc Leclercq (jOmO), Francio/Pollando)	3-5
La homo kaj landlimoj (Rubén Feldman González, Meksiko/Usono)	6
Familiaj valoroj kaj enmigrado (Mar Kardenas-Loutzenhaiser, Meksiko/Usono)	7
Insulo de Larmoj... Insulo de Espero (Ĵenja Amis, Ukrainio/Usono)	8-9
Enketado:	
Enmigrantoj en la lando de enmigrantoj	10
"Creative Commons" en Esperanto: Paŝeto al plia libereco (Yves Nevelsteen, Flandrio (Belgio))	11
Esprimu vin libere (Chuck Smith, Germanio/Usono kaj Judith Meyer, Germanio)	11
Libero de elekto (M. Saniljeviĉ, Rusio)	12
Por la Nova Homaro! (Konstantin Aleksandrov, Rusio)	12
Limigo de la libereco: ĉu nun ankaŭ fare de liberemuloj? (Martin Lavallée, Kanado)	13
Recenze: Certe pli ol nenio (Paŭlo Mojajev, Ukrainio)	13
"Por ĉiu irakano, kiu mortas per bomboj, naskiĝas kelkoblo da teroristoj" (Etsuo Miyoshi, Japanio)	14
Anguleto: Ĉu nura koincido? (Aneta Ubik, Germanio/Argentino)	15
Informe	15
Facila vortolisto	16

Fotoj sur la kovrilo (centre) "La enmigrantoj": monumento al enmigrantoj, Novjorko (skulptisto Luis Sanguino); (fone) suda Manhatano, Novjorko; (sube) dokumentoj el la Muzeo de Enmigrado (la insulo Ellis, Novjorko). Fotis Ĵenja Amis.

Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi pri-movadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi *vian* artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

LIBERECANA VOJAĜO AL LIBERECANA CENTRO



KOMPLEZE DE JOMO

Kiam dum la Esperanto-festivalo “Velura Sezono” (en Jalto, Ukrainio, somere 2004) la ĉefa artisto jOmO subite malaperis, la organizantoj estis vere ŝokitaj. Feliĉe, post kelkaj tagoj la kantisto revenis. Jen eta raporto pri liaj aventuroj.

*Jean-Marc Leclercq (jOmO),
Francio/Pollando*

Jen mi sidas en la kupeo. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu estas vero aŭ sonĝo – mi veturas al Gulaj-Pole*! La decido estis iomete subita, ĉar mi ne planis iri tien kiam mi komencis tiun ĉi vojaĝon. La hazardeco de la programo de “Velura Sezono” ebligas al mi veturi. Mi tamen devis vekigi tiun ĉi merkredon je la sesa matene por ne tro fuŝi la tempon kaj mi devas reveni vendrede antaŭ la vespero por koncerti en Jalto sub la statuo de Lenino fronte al la maro. Mi scias, ke Jefim (la ĉeforganizanto de la aranĝo) eble maltrankviliĝos pro mia “malapero” – la organizantoj ĉiam maltrankviliĝas, se la artisto malaperas de festivalo, sed la alvoko de Gulaj-Pole estis tro forta. Estas tre bedaŭrinde, ke mi devas lin malhelpi, ĉar li estas la plej afabla homo en la mondo...

La celo

Kio do estas tiu mia vojaĝo? Ĉu pilgrimado? Ĉu literatura laboro? Ĉu turismo? Mi ne povas diri precize, pli verŝajne tiu

fuĝo estas samtempe triopa plenumo.

Pilgrimado? Kiom da tempo ni babilis en Tuluzo kun liberecanaj amikoj pri la “promesitaj landoj” de anarkiismo: Katalunio kaj Ukrainio! La unua estas ege proksima al ni kaj multaj tuluzanoj estas filoj aŭ nepoj de batalantoj de la hispana revolucio. Ĝenerale, la loĝantoj de nia urbo semajnfinitas en Barcelono por ĝui la etoson de la urbo, kiu estas sufiĉe konata al ni. Sed Gulaj-Pole! Nomo, kiun oni trovas nur en libroj. La komparo kun Mekko por islamanoj aŭ Jerusalemo por judoj, Romo por kristanoj estas facila, amuza, sed neevitebla.

Literatura laboro? Certe. Mi pretigas romanon en la okcitan lingvo (la provenca, se vi preferas), kiu raportos pri tiu nekonata parto de historio; ĉu do eblas priskribi regionon aŭ urbon ne konante ĝin? Mi admiras la laboron de Hergé, la belga desegnisto de Tinĉjo, kiu detale pentris la pejzaĝojn de Tibeto aŭ Andoj por fonumi la aventurojn de sia juna heroo. Mi tro timus erari parolante pri la urbo kaj la ĉirkaŭa kamparo.

Turismo? Denove certe. Mi elektis ĵeti en mian sakon la romanon “La Kozakoj” de Tolstojo, kvankam ĝi ne temas pri la zaporogoj**. Mi deziregas malkovri la kaŝitan flankon de Ukrainio, for de la urboj, tie, kie nur ukrainianoj vivas kaj laboras. Mi eĉ volus aĉeti poŝtkartojn por sendi al diversaj amikoj en Tuluzo. Jes, vi bone legis, poŝtkartojn de Gulaj-Pole!

La vojo

La fervojo trakuras la historian **istmon** de Perekopo. Mi algluas mian nazon al la vitro kaj tordas mian kolon por provi vidi ion precizan. Mi provas imagi la Nigran Kavalerion sturmantan la Blankan Armeon por venke trarajdi la Turkan Muregon kaj eniri Krimeon. Mia gorĝo sekas. Mia rigardo malfacile povas forlasi la belegan pejzaĝon. Mi tamen revenas al Tolstojo.

La ebenaĵo diskuŝiĝas. Tra la trajna fenestro Dnepro larĝegas, ĝi ŝajnas esti maro kun nekredeble ĉarmaj insuloj. Mi ne plu povas legi. La stepo aperas, majesta. Mi tremetas. Jam la frazoj de la naskiĝanta romano venas en mian cerbon:

“La larĝa legenda spaco de la Sovaĝaj Kampoj malvolviĝis antaŭ miaj okuloj ĝis malaperi ĉe la alia flanko de la horizonto. La altaj herboj iĝis verdaj ondoj sub la blovo de la vento, precize kiel mi imagis legante la romanojn de Gogolo dum miaj studentaj jaroj. Ŝajnis al mi, ke nia trajno salutis la alvenon en la stepon per ĝoja fajfo...”

La unuaj impresoj

Finfine, post kvin horoj da veturado, la trajno atingas la urbon Zaporozĵe (ukraine: Zaporizĵja). Mia unua ago estas aĉeti la revenbileton, por ke mia vojaĝo ne iĝu katastrofo (se mi ne povus koncerti en Jalto). Jam farite, mi trankviliĝas kaj pluas. Antaŭ la stacidomo atendas nur unu taksio, do la elekto estas facila. Post



nesukcesa kaj mallonga diskuto pri la prezo ni startas. “Harazd, pojĥali!”***. La ŝoforo estas ege simpatia, li nomiĝas Nikolaj. Ni babilas duone ukraine, duone ruse, duone ioajne, kaj la etoso estas bona. Tiuj momentoj, kiam vi povas renkontiĝi kun lokanoj kaj paroli longe estas malfeliĉe tro maloftaj. Mi do ĝuas. Mi diras pri la celo de mia ekskurso. Li diras al mi, ke Maĥno estas nacia heroo. Mi ĝojas, sed ankaŭ timas pri tio, ke la oficiala historio povas proprigi al si la anarkiisman revolucion kaj ŝanĝi ĝin al naciaĵo.

Ni traveturas malebanan pejzaĝon de malhela tero, la arboj ĉefe estas popoloj. La suno komencas malaltiĝi, la aero estas varma, mi sentas min ege bone, mi vivas.

Subite aperas la ŝildo de la urbo Gulaj-Pole. Mi petas Nikolajon, ke li malrapidigu la aŭton, kaj mi fotas la ŝildon. Eble mia ŝoforo taksas min malofta turistito. Mia koro batas eble pli forte, miaj okuloj volas gluti ĉion videblan tra malfermita fenestro. Ni alvenas en Gulaj-Pole-n!

“Ĉi tie ni parolas en la maĥna lingvo!”

Estas pli-malpli la sepa posttagmeze, kiam Nikolaj lasas min en la centro de la urbo, apud la nura hotelo, kiu nomiĝas „Tavria”. Mi poste ekscios, ke tio estas la malnova nomo de Krimeo. La akceptantino estas afabla kaj eĉ bonkore ridas. En la sama frazo ŝi miksas la ukrainan lingvon kun la rusa. Mi demandas ŝin, en kiu lingvo ŝi parolas, kaj ŝi respondas:

– Ĉi tie ni parolas en la maĥna lingvo!

Tio estas bona komenco. La hotelo estas malmultekosta kaj mezluksa. Precize tio, kion mi serĉis. Mi lasas mian sakon en la

ĉambro kaj tuj foriras por ekvidi la urbon. Mi ne povas maltrafi eĉ unu minuteton! Bedaŭrinde jam noktiĝas. Mi promenas en la stratoj kaj volas spiri la lokon. La urbo bonodoras je la kamparo, kaj vidante la lumon, elirantan el la etaj fenestroj de la lignaj domoj, oni povas diveni la naturan, simplan kaj trankvilan vivon de la loĝantoj. Ĉiu domo estas ĉirkaŭita de ĝardeneto, en kiu pomarboj proponas siajn branĉojn kaj fruktojn al piediranto sur la trotuaro. En unu aleo la branĉoj de la ĝardenaj arboj eĉ interplektiĝas kun tiuj de la strato por formi folian tegmenton tuj ĉe la kapoj. Estas agrabla somerfina vespero, la odoroj estas plaĉaj, mi vagas en mezreala impresio. Mi haltas sur la ĉefa placo. Mi ne povas rezisti la deziron fari telefon-vokon. Mi scias, ke tio estos eble freneze multekosta, sed mi volas disdoni mian ĝojon. Mi telefonas al la du personoj, kiuj povas kunsenti la gravecon de la loko, kie mi estas. Iomete kiel infano, mi ŝercas:

– Saluton, Flo! Divenu, kie mi estas?

La malhelo devigas min fini la promenon kaj iri al la restoracio, kiun mi vidis apud la hotelo. En ĝi mi denove sentas min en granda urbo. Ĝi estas tute nova, ornamita laŭ moderna orienteŭropa stilo, kiu rememorigas al mi mian karan Pollandon.

La manĝo estas por mi la eblo reprivensu la lastajn okazaĵojn. Mi estas sola, meze de la stepo, en la urbo de Batko Maĥno, kaj neniu tion scias. Morgaŭ mi havos tutan tagon por esplori la lokon, kaj mi ne povas elteni plian atendon. La manĝo estas bongusta kaj sana, kun multaj legomoj. Ni estas nur du klientoj. Eble estas ankoraŭ iomete frue. La laceco malpermesas al mi pensi plu, mi devas iri dormi.

Ekstere la nokto trankvilas, mi ĝuas ĉiun paŝon ĝis la hotelo. Mi ekdormas tuj.

La profunda konatiĝo

Birdoj, supozeble korvoj (mi ne estas fakulo pri birdoj, estante deĉiama urbano), sur la arboj ĉe la alia flanko de la strato vekas min. Mi mense notas tion por la romano. Mi volas, ke ĉiu detalo kongruu. Tia detalo gravas, ĉar ĝi estas travivita. Febre mi fermas mian sakon kaj eksteriras. Tuta tago libera en Gulaj-Pole! Mi decidus unue iri trinki kafon en trinkejo, ĉar kafumi frue matene en nekonata fremda urbo estas por mi unu el la plej grandaj plezuroj de la vivo! Mi esploras la kvartalon kaj komprenas, ke estas ankoraŭ tro frue. La nura trinkejo, kiun mi vidas, estas ankoraŭ fermita. Kion fari? Mi paŝas ĉirkaŭ la ĉefa centra placo, kaj decidus pli malproksimiĝi. Mi fotas, fotas, fotegas. La lokanoj min rigardas. Ili facile povas kompreni, ke mi estas turista de stranga speco. Eble aperas fojfoje kelkaj tiaj pilgrimantoj kaj ili jam alkutimiĝis. Mi salutas ilin. Ili responde salutas min. Mia promeno gvidas min sufiĉe rapide ekster la urbon. Mi fotas la ĉirkaŭaĵojn, la stepon, unu lageton kun anasoj (ĉi-foje mi certas, ke ili estas anasoj), ne sciante ke nun mi fotas la frontpaĝon de mia romano!

Bonŝance mi trafas bazaron. Mi rigardas la nekredeble multajn legomojn, mense farante notojn, dum la homoj rigardas min. Mi aĉetas biskvitojn kaj... ŝtrumpetojn. Mi malbone elektas: mi aĉetas simplajn nigrajn ŝtrumpetojn, samajn, kiel ĉiuj miaj ŝtrumpetoj, kaj mi poste ne plu



La ŝildo “Gulaj-Pole”

KOMPLEZE DE JOMO

povos scii, kiujn mi aĉetis en Gulaj-Pole!

Poŝtofcejo malfermiĝas je la oka. Mi staras en la vico kaj konstatas kun plezuro, ke la homoj parolas ukraine. Mi ĝojas partopreni la ĉiutagan vivon de la loĝantoj. Malfeliĉe ne ekzistas poŝtkartoj de Gulaj-Pole. Mi aĉetas poŝtmarkon por sendi la karton, kiun mi jam skribis (ukrainlingve!) antaŭ du tagoj al mia instruantino de la ukraina lingvo, Lilja.

Sur unu muro pendas ŝildo kun vizaĝo de Nestor Maĥno. Mi fotas ĝin plurfoje kaj faras la enskribon en mia notlibreto: "En tiu ĉi domo loĝis en la jaroj 1918-1920 la milita kaj *gromadsko-politiĉnij* aganto N.I. Maĥno (1888-1934)". Mia malgranda vortaro (ukraina-pola) klarigas al mi ke "gromadsko-politiĉnij" povas signifi "soci-politika", sed ĉi-kaze la signifoj de la vortoj estas gravaj, do mi tradukos hejme. Mi rimarkas, ke la vorto "anarkiisto" ne estas.


Finfine malfermiĝas la muzeo de la urbo. Mi imagas kun tremeto, ke hodiaŭ povus esti la ripoza tago de la muzeo. En Francio muzeoj estas fermitaj marde, kaj mi ofte volis viziti muzeojn ĝuste marde!

En la enirejo, tuj fronte al la pordo, sur kolono, la vizitanton akceptas belega busto de Batko Maĥno. Nun mi certas: la memoro pri li estas ankoraŭ ege-ege vivanta. Super ĝi pendas la blazono de la urbo: kuranta ĉevalo. Tuj alvenas la gvidisto, kiu proponas al mi prikomentatan ekskurson. Mi konsentas kun granda ĝojo kaj feliĉas, ke mi povos demandi al iu ĉion, kion mi volas scii. Li estas alta, juna, li parolas ruse rapide, sed sufiĉe klare por ke mi povu kompreni 60 procentojn de liaj komentoj. En la kelo de la

muzeo (estas eks-banko) troviĝas kvar salonoj: unu pri la neolitika periodo (mi paciencie atendas la finon), la alia pri la kozaka periodo (interesa), la tria estas tradicia ukraina "ĥato" (mi fotas fotile kaj mense), kaj la lasta reprezentas la internon de domo de la 19-a jarcento.

En la supra etaĝo la ekspozicio saltas al miaj okuloj: jen staras "taĉanko" (ĉevalturata kaleŝo kun maŝinpafilo), tipa armilo de la anarkiista luktmaniero. Per tiuj rapidaj kaj malpezaj veturiloj ili sukcese batalis kontraŭ ege pli multaj kontraŭuloj. Estas nun la pinto de la vizito. Ni estas solaj en la muzeo, do mi povas superŝuti lin per demandoj. Fakte, ne pri la historio, ĉar mi bone konas ĝin, sed pri tio, kio restas en la lando de tiuj pasintaj eventoj. Li komprenas, kio estas la celo de mia veno, kaj li rakontas pri tiu franca virino, Helene Chatelain, kiu venis antaŭ kelkaj jaroj por fari dokument-filmon. Mi vidis ĝin sur kasedo pruntedonita de liberecana amiko. Mi memoras, ke mi sensukcese penis ekvidi tie la urbon Gulaj-Pole, sed ĝi ne estis sufiĉe videbla. Li proponas al mi aĉeti la libron pri Nestor Maĥno. Eldonita en la ukraina en 1999, ĝi prezentas tekstojn, fotojn kaj eĉ partiturojn de kantoj de la maĥna epoko. Ĝi nomiĝas "Nestor kaj Galina". Mi feliĉas, ĝi estos por mi utila referencilo.

La aliaj salonoj de la muzeo temas pri la dua mondmilito (la amasbuĉado de multegaj judoj fare de faŝistoj), pri la soveta periodo kaj pri sendependa Ukrainio. Elirante el la muzeo, mi babilas kun ĝia direktorino, kiu denove parolas pri tiu franca filmistino, kiun ŝi bone memoras.



Busto de Maĥno en la muzeo

La adiaŭo

Mi komencas finan promenon en la urbo antaŭ la mikrobusa reveno. La urbo estis terure detruita dum la lasta milito. La preĝejo, la sinagogo, la malnova tombejo ne plu ekzistas, bedaŭrinde. La pli multaj konstruaĵoj ankoraŭ elmontras siajn suferojn kaj vundojn de la milito. Mi sidigas sur benkon de busa haltejo por desegni la mapon de la urbo kun la nomoj de la stratoj.

En la mikrobuso, kiu portas min al Zaporozĵe, mi provas legi la libron, sed la buso saltas tiel forte pro malebeneco de la vojo, ke mi ne povas. Bone, ke mi multe fotis; se ne, mi eble ne povos kredi ke mi estis tie. Malpli ol dudek kvar horoj – tio ne sufiĉas, sed mi feliĉas, ke mi estis. Plenigas min la miksitaj sentoj de gajeco, fiereco... kaj laceco. Ankaŭ la sento de sukceso plenumita tasko.

istmo – mallarĝa terkolo inter du maroj

* Gulaj-Pole – urbo en Ukrainio, en kiu naskiĝis kaj aktivis fama anarkiisto Nestor Maĥno (familiare nomata ankaŭ "Batko Maĥno" – Paĉjo Maĥno).

** Zaporogo – kozako, kiu vivis ĉe la suba fluo de Dnepro, en la regiono, nomata Zaporozĵe (ruse) aŭ Zaporizĵa (ukraine): laŭvorte – la teritorio, situanta sube de la enakvaj rokoj de Dnepro; en tiu regiono dum malfrua mezepoko ekzistis la kozaka ŝtato: Zaporozĵskaja Seĉ (ruse) aŭ Zaporizka Siĉ (ukraine).

*** "Konsentite, ni veturu" (ukraine).



Ĵomo koncertanta dum "Velura Sezono" en Ukrainio (Krimeo), 2004

Mi estas “homo de landlimoj”. Iam mi laboris en Patagoniaj Andoj kiel infankuracisto, ĉe la limo inter Argentino kaj Ĉilio. Mi soldatiĝis en Concordia (Argentino), kaj mi devis militservi ĉe la landlimo inter Urugvajo kaj Argentino. Poste mi kuracistis en Warren, Norda Pensilvanio, proksime al Toronto, ĉe la limo inter Usono kaj Kanado. Kvin jarojn mi loĝis en Alasko, la tiel nomata “Lasta landlimo”, kiel anoncas la aŭtovojaj ŝildoj. Dum du jaroj mi loĝis en Miamo, kiu estas iusence limo inter Usono kaj Latina Ameriko. Do, dum mia vivo mi vidis multajn landlimojn. Kiom multas ili en la tuta mondo?

Longa kaj malĝoja limo: Usono–Meksiko

Birdoj, papilioj, balenoj kaj tigroj ne havas limojn – nur la homoj inventis ilin. La homa penso inventis timegojn, ekzemple la timon pri malriĉeco, pri malestimo, pri eksterlandanoj, pri nekonatoj kaj pri la morto. El tiuj timoj ekfloris landlimoj, kaj ju pli firmaj ili estas, des pli teruraj estas la militoj kaj la ĉiutagaj problemoj ĉe la landlimoj. Inter ĉiuj landlimoj, kiujn mi vidis, la plej impresa ŝajnas al mi tiu, kiun mi trovis en Kalifornio.

Ĝi estas 3250 kilometrojn longa kaj estas multe pli kruela ol la Berlina Muro, iam ekzistanta. Tiu lasta, malgraŭ tio, ke ĝia celo estis disdividi la ŝajne nemikseblajn kapitalisman kaj socialisman ekonomiajn sistemojn, estis nur ŝtona kaj iusence simbola. Sed la Uson-Meksika landlimo estis komence pikdrata, tamen post ĉiutaga detruo fare de la persistaj meksikanoj, kiuj volis portempe labori en Usono, ĝi fariĝis ŝtala muro, kiu etendiĝas eĉ en la Pacifikan Oceanon je preskaŭ du mejloj.

La Uson-Meksika landlimo prezentas multe pli kompleksan fenomenon, ol tiu de la Berlina Muro. La Uson-Meksika landlimo gardas la riĉulan Nordon kontraŭ la malriĉula Sudo. Ĝi dividas la “blankan” anglalingvan kulturon disde la “bruna” hispanlingva loĝantaro. Ĝi servas kiel malfacile trapasebla baro inter protestantoj kaj katolikoj, enspezantoj kaj pagantoj, “vendistoj el Usono” kaj “aĉetantoj el Meksiko”, inter “ĉiopova ŝtelisto” kaj “senpova viktimo”.

Kaj tamen malgraŭ ĉiuj tiuj ekstremaj diferencoj ĉe ambaŭ flankoj de la landlimo, la landlimo mem neniel povas

La homo kaj landlimoj



La limo inter Nogales, Arizono (Usono) [maldekstre] kaj Nogales, Sonora (Meksiko) [dekstre]



Atenton: malpermesate

drogkomercon kaj armit-vendadon. Multaj homoj ĉe tiu landlimo (plejparte meksikanoj) estas ĉiutage akuzataj pri krimoj, batataj, seksatencataj, malaperigataj kaj eĉ mortigataj.

Landlimoj ne multe helpas

Kio igas la homojn tiel insiste trarompi tiun limon? La respondo estas tre simpla: la bezono de ĉelandlimaj usonanoj pri malmultekosta labor-forto kombinita kun la meksikana deziro plibonigi la vivnivelon. Por mi, kiel por deproksima observanto, tio estas evidenta. Mi nun loĝas en la usona urbo Calexico, kiu situas tre proksime al la Uson-Meksika landlimo. La plej proksima meksika urbo – Mexicali (facilas rimarki, ke la nomoj de ambaŭ urboj estas konstruitaj el la partoj de du vortoj: Kalifornio kaj Meksiko) – estas dividita disde la usona urbo per nura muro. Tamen en Calexico la minimuma salajro estas 5 dolaroj por laborhoru (la informo pri aprilo 2002), dum en Mexicali ĝi estas nur 50 cendoj por laborhoru (se entute pagata).

Malgraŭ la frapaj ekonomiaj kaj kulturaj diversecoj, psikologie inter la loĝantoj de ambaŭ ĉelimaj urboj kreskas la kompreno pri la granda interdependeco inter la popoloj trans landlimoj. Ekzemple, la loĝantoj de ambaŭ urboj jam devis kune

plani agrikulturan irigacion, purigon kaj kontraŭpoluan protekton de la rivero Kolorado.

Eĉ pli paliĝas la efikeco de la landlimo, se oni konsideras, kiom multaj meksikanoj leĝe aŭ kontraŭleĝe vivas kaj laboras en Usono. Oni ekzemple pritaksas, ke ses milionoj da kaliforniaj civitanoj de Usono havas meksikan devenon; ke kvar milionoj da meksikanoj loĝas en Kalifornio laŭleĝe kaj ĉ. tri milionoj – kontraŭleĝe; ke ĉirkaŭ unu miliono da meksikanoj partoprenas en la Usona programo de “Sesmonataj Agrokulturaj Laboristoj”. Oni do facile povas konvinkiĝi pri tio, ke eĉ la plej netrapaseblaj limoj ne bone plenumas sian rolon.

“La landlimo enestas en mi”

Tiujn vortojn iam diris la meksika verkisto Carlos Fuentes. Lia eldiro kongruas kun la ideoj de fama psikologo Carl Jung, kiu opiniis, ke multaj konfliktoj okazantaj en la ekstera mondo estas fakte projekcio de la personaj internaj disdividaj konfliktoj. Lia instruo pri la ekzisto de Universala Konscio (kiu unuigas ĉiujn personajn konsciojn) povas helpi al la homoj kompreni, ke la penoj de la homa cerbo ĉiam disdividi kaj fragmentigi estas nur emo, sed ne nepre fundamenta eco.

Venis jam la tempo, kiam la homoj devas kompreni sian universalan interligitecon. La malgrandaj “identecoj” kiel, ekzemple, “kuracisto”, “patro”, “filo” ktp. kondukas nur al plua dividemo de la konscio kaj sekve al la emo de la homo disdividi la ĉirkaŭan mondon. Tamen la alprenado de iu universala identeco, la identeco sen limoj ebligas al la homo kompreni, ke homaro estas unu estaĵo, kiu tute ne bezonas la internajn limojn.

Familiaj valoroj kaj enmigrado

Mar Kardenas-Loutzenhaiser,
Meksiko/Usono

En la febroplena enmigrada debato la prezidento de Usono G. Bush penas okupi la plej prudentan pozicion. Dum sia vizito en Meksikon pasintmonate, Bush emfazis la neceson de “meza” solvo inter la senkondiĉa amnestio kaj la minaco deporti 12 milionojn da homoj (kion li nomas “sensenca parolado”). Ankaŭ antaŭe dum siaj vizitoj en multajn landojn de Latinameriko, Bush serĉis la oran mezon. Li asertis sian kredon, ke “familiaj valoroj ne haltas ĉe Rio Grande inter Usono kaj Meksiko”. Sed samtempe li ankaŭ deklaris en Gvatemalo, ke Usono ja rajtas apliki siajn enmigradajn leĝojn kaj postuli obeon al ili. Ĉu do la prezidento sukcesos pri sia strebo al la mezo?

Kelkaj insistas pri tio, ke se la kaŝenmigrintoj havas infanojn, naskitajn en Usono, tio devus sufiĉi por permesi al la enmigrintoj resti en Usono. Temas pri la lastatempaj rastadoj de kelkaj entreprenoj, dum kiuj oni kaptis kaj deportis multajn neleĝajn enmigrintojn, malgraŭ tio, ke multaj per tio forlasis siajn infanojn, naskitajn en Usono. Unue, tia afero okazis en la vianda kompanio “Swift & Co.”, kiun decembre priserĉis la agentoj de ICE (angle “Immigration and Customs Enforcement” – la organizo, kiu okupiĝas pri kontrolado de la enmigraj reguloj). Dum tiu rastado oni kaptis preskaŭ 1.300 neleĝajn laboristojn. Multaj arestitoj lasis siajn infanojn, kaj komunumaj aktivuloj devis aranĝi la infan-prizorgadon.

Dufoje simila afero okazis marte en New Bedford, Masaĉuseco, kie ICE rastis fabrikan led-varojn, kiu produktas veŝtojn kaj tornistrojn por la Usonaj militistoj.

Ĉirkaŭ 360 laboristoj estis kaptitaj (plejparte virinoj) – kaj la bonfaraj societoj denove devis serĉi kaj helpi la forlasitajn gejunulojn.

Post tiuj rastadoj Deval Patrick (ŝtatestro de Masaĉuseco) deklaris “vivminacnan krizon”. Masaĉuseca senatano Edward Kennedy diris, ke ICE estis “maldelikata”. Kaj masaĉuseca kongresano Barney Frank, asertante, ke la organizo estis malvarmakora, sprite rimarkis, ke “ICE ne estas malbona nomo por tiuj ĉi homoj” (la angla vorto *ice* signifas “glacio”). Klaras, ke post tiaj pritaksoj ICE akiris malbonan reputacion malgraŭ tio, ke ĝi nur faris sian laboron. Bedaŭrinde, la nunaj leĝoj ne ebligas fari esceptojn pro familiaj kaŭzoj. Ĉu eblas iel ripari la situacion?

Kongresano Jose Serrano (Novjorko) esperas krei la escepton, uzante la tribunalojn. Li apogas la leĝproponon, kiu donus al la juĝistoj, kiuj pritraktas la kazojn de enmigrintoj, pli da povo, kiam ili konsideras la efikojn al la familioj kaj faras la decidon, ĉu deporti la enmigrinton aŭ ne. Tio ŝajnas bona, tamen ni ne atingi la limon, trans kiu la fakto, ke iu havas infanojn naskitajn en Usono, aŭtomate permesas pluan restadon en la lando. Tio kreus pli da problemoj, ol eblas solvi.

Unue, tio estas nepraktika – la nombro de tiuj homoj estas tro alta. Laŭ *Pew [pju] Hispanic Center*, estas ĉirkaŭ 3 milionoj da infanoj naskitaj en Usono, kies almenaŭ unu gepatro estas neleĝa enmigrinto. Ĉirkaŭ dek procentoj de Usonaj familioj havas almenaŭ unu membron, kiu loĝas ĉi tie kontraŭleĝe. Do tiu “prizorgado de uson-naskita infano” povus koncerni milionojn da homoj, kio simple senfortigus la leĝon.

Due, tia politiko incitos la



Maldekstre: Nogales, Arizono (Usono); dekstre: Nogales, Sonora (Meksiko)

kontraŭulojn de la enmigrado, ĉar oni povos paroli pri la tiel nomataj “ankraj beboj” – la infanoj, kvazaŭ “speciale” naskitaj en Usono por ankri la gepatrojn en la lando. Fakte, tio estas trosimpligo, ĉar nur unu afero ankras neleĝajn enmigrintojn en Usono: laboro.

Kaj fine, la permeso resti en Usono pro la fakto, ke la homo havas uson-naskitajn infanojn, nur konfuzas la demandon pri tio, kiu efektive respondecas pri la necerta stato de la enmigrintoj. Estas ja vero, ke la gepatroj de tiaj infanoj faris almenaŭ tri erarojn: 1) ili venis en la landon kontraŭleĝe; 2) ili naskis infanojn dum ili estis en necerta situacio, en kiu ili povus esti arestitaj kaj deportitaj iam ajn; kaj 3) ili lasas tiun necertecon daŭri dum jaroj – do ne klopodas leĝigi siajn ĉeeston kaj aktivadon en la lando. Klaras, ke la enmigrintoj grandparte mem kulpas pri siaj problemaj situacioj.

Kompreneble, oni povas

kulpigi ankaŭ la registaron kaj la difektan enmigradan sistemon. La procedo de laŭleĝa enmigrado certe ne estas facila. Ĝi estas tre komplika, multekosta kaj longa. La enmigrintoj ofte ne scipovas la lingvon kaj ne scias, kion ili devas fari, aŭ simple ne havas sufiĉe da mono por pagi por tio.

Unu afero estas certa: resti en la ora mezo en ĉi tiu emocia debato, esti justa kaj fari decidon akcepteblan por ĉiuj estas preskaŭ neeble.

La aŭtorino de la artikolo naskiĝis en la urbo Morelia (Meksiko). Laborante por la Usona Mararmeo dum sep jaroj (1984 – 1991), ŝi loĝis kun sia familio en Japanio dum tri jaroj. Ŝi estas instruistino en publika lernejo kaj profesia tradukisto. Ekde la jaro 2005 ŝi lernas Esperanton kaj nun estras la grupon “Amikema” kaj la infanklubon “La Verda Stelo”.



Insulo de Larmoj... Insulo de Espero

Ĵenja Amis, Ukrainio/Usono

Dum mi skribas tiujn ĉi vortojn, mi rigardas la foton. Tio estas simpla inform-ilo el tre neordinara muzeo – la muzeo de en-migrado sur la insulo Ellis, Novjorko. Ĝi estas tre malnova foto, de la frua 20-a jarcento. En tiu foto estas virino en kamparana kaputuko, kiu kvazaŭ rigardas rekte en la okulon. Ŝi aspektas laca, zorgo-plena, simpla kaj inteligenta. Sed la plej interesa afero pri ŝi estas ke mi tute ne povas kompreni, kiom aĝa ŝi estas: ŝi aspektas maljuna kaj juna sam-tempe! Mi ŝatas rigardi ĉi tiun foton kaj el-pensi, el kiu lando ŝi povus esti, kion ŝi faris, kie ŝi loĝis – kaj kion ŝi pensis, kiam ŝi unuafoje ekvidis la Statuon de Libereco super la vasteco de Atlantiko!

Tra la pordo de Usono

Mi legis pri la insulo Ellis la unuan fojon kiam mi ankoraŭ estis infano – en la rakonto de Ŝolom-Alejhem*. Tiu ĉi bonega – amuzmalgaja – rakonto de la frua 20-a jarcento

temis pri la vojaĝo de malriĉa rusa juda familio al la Nova Mondo, por komenci la novan vivon en la nova patrujo. Por tiu ĉi familio, same kiel por milionoj da aliaj homoj el la tuta mondo, la enmigro sur la insulo Ellis estis la “pordo” al tiu ĉi nekonata mondo. Mi neniam povis pensi, ke post pluraj jaroj ankaŭ mi enmigros Usonon – kaj eĉ vizito la insulon Ellis, kiu nun estas muzeo.

Kiel skribis la usona prezidento John Kennedy [ĝon kenedi] en la libro “La nacio de enmigrintoj”, “estis eble tiom da kialoj por veni al Usono, kiom estis da homoj, kiuj venis”. Religiaj kaj politikaj kialoj, senlaboreco, malsato kaj malriĉeco, familiaj ligoj aŭ simple vojaĝemo: tiuj ĉi estis nur kelkaj el la kialoj de la plej granda enmigro en la moderna historio. Ekde la jaro 1892 ĉirkaŭ 12 milionoj da homoj faris siajn unuajn paŝojn en Usono sur la insulo Ellis, kaj pli ol cent milionoj (!) da usonanoj (ĉirkaŭ 40%) povas diri, ke iliaj antaŭuloj venis en Usonon tra tiu ĉi insulo, kiu okupas nur malpli ol 130 mil kvadratajn metrojn! Tiun ĉi ter-pecon apud Novjorko iam posedis komercisto Samuel Ellis, kaj en la malfrua 18-a jarcento tie estis drinkejo kaj manĝejo por maristoj kaj fiŝ-kaptistoj. La enmigro fermiĝis en 1954, kaj oni for-lasis ĝin por 30 jaroj. Meze de la 80-aj jaroj oni renovigis la ejon kaj faris ĝin muzeo (la muzeo malfermiĝis en 1990). Nun Ellis estas la memoraĵo al ĉiuj enmigrintoj en Usonon.

12 milionoj da homaj vivoj

Mi havis interesan senton, kiam mi eniris la muzeon: grandan, viktoria*-stilan ruĝ-blankan konstruaĵon. Ial ŝajnis al mi, ke mi iam estis en tiu ĉi loko – ĉu eble pro tiu ĉi rakonto de Ŝolom-Alejhem, aŭ eble mi ja estis tie en mia antaŭa vivo?

La unua granda ĉambrego iam estis “pakajejo” – nun tie troviĝis aro da divers-grandaj kaj divers-formaj ujoj, ludiloj, ŝuoj kaj aliaj valoraj ujoj de la enmigrintoj. La pakajejo estas vere grandega, sed, ver-ŝajne, ĝi ĉiam estis plen-plena: ja ĝi estis la ejo por miloj da homoj ĉiutage. Nur imagu: fine de la 18-a jarcento ĉirkaŭ kvin mil homoj enmigris en la landon ĉiujare, kaj en la komencaj 1900-aj preskaŭ 12 mil homoj venis tra la insulo Ellis nur en unu (!) tago!

La enmigro sur Ellis malfermiĝis antaŭ pli ol cent jaroj – la unuan de januaro 1892. Post kvin jaroj la originala ligna konstruaĵo tute forbrulis, kune kun multaj informoj pri la enmigrintoj... Sed la 17-an de decembro 1900 la nova ne-brul-ig-ebla enmigro salutiĝis 2.251 novajn enmigrintojn. Ekde tiam ĉiu-tage ŝipoj portis al la insulo Ellis milojn da homoj. La plejparto de la enmigrintoj estis malriĉuloj, kiuj vojaĝis en plen-plena, plej malalta klaso de la ŝipo, sen fenestroj kaj decaj necesejoj. Fakte, ĝuste tiuj malriĉuloj devis tra-iri la insulon Ellis – la riĉuloj aŭ mez-klasuloj, kiuj veturis en la unua kaj la dua klasoj, ricevis siajn enmigrajn dokumentojn jam sur la ŝipo kaj eniris la landon pli-malpli aŭtomate.

La ŝipoj kun enmigrintoj venis plejparte de Okcidenta Eŭropo (ekz., Antverpeno). Sendado de enmigrintoj estis same profita (aŭ eble eĉ pli profita), ol sendado de aĵoj – eĉ malgraŭ tio, ke la ŝip-kompanioj devis proporkoste pagi reven-bileton, se oni pro iu ajn kialo malakceptis enmigrinton. Ĝuste pro tio la ŝip-kompanioj estis la unuaj, kiuj elektis – aŭ malakceptis – enmigrintojn.

Estu sana. Aŭ almenaŭ ŝajnigu tion!

Sur la muroj de la ĉambretoj, kiuj antaŭe estis atendejoj, dormejoj, legejoj kaj tiel plu, estas multaj fotoj, kiuj montras ĉiujn ŝtupojn, kiuj atendis la novajn enmigrintojn en tiu ĉi loko. Unue ĉiuj devis trairi ses-sekundan sanekzamenon. Se oni pensis, ke la homo povas esti malsana, li/ŝi devis pasi pli seriozan sanekzamenon (por trovi malsanulojn, la kuracis-



“Antaŭ kaj poste”: multaj socialaj laboristoj donacis al novaj enmigrintoj uson-stilajn vestaĵojn kaj foje eĉ helpis fari uson-stilajn har-arangojn

ELLIS ISLAND NATIONAL MONUMENT



Dum san-ekzameno



Enirejo al la muzeo

toj rigardis la homojn eniri la konstruaĵon, supren-iri la ŝtuparon kaj tiel plu). Se malsano ne estis tre grava kaj trans-don-ebla, oni provis kuraci la homojn en la loka hospitalo, tamen, oni tuj for-sendis hejmen grave malsanajn homojn. Kvankam oni malpermesis la eniron al sufiĉe malmultaj homoj ĝenerale – al ĉirkaŭ du procentoj de la homoj – tamen tio signifas, ke entute en la historio de la insulo Ellis ĉirkaŭ 240 mil (!) homoj ne povis eniri la landon. Ĉirkaŭ tri mil eventualaj enmigrintoj mortis en la hospitalo de la insulo...

Ĉefe oni ne enlasis gravajn malsanulojn, **krimulojn** kaj mens-malsanulojn – sed foje ankaŭ ne-**metiaj** laboristoj ne povis eniri; ofte eĉ la plej proksimaj familianoj devis resti ĉe malsamaj flankoj de la oceano... Ankaŭ la filo de Ŝolom-Alejĥem, kiu suferis de **tuberkulozo**, ne povis eniri. Por iuj la insulo Ellis estis insulo de Espero, por aliaj – la insulo de **Larmoj**... Mi memoras aŭd-rakonton de unu tre maljuna ukrainino, kiu enmigris Usonon en la fruaj 20-aj jaroj. Ŝi rakontis, ke post longa vojaĝo ŝi fartis malbone, kaj la kuracisto markis ŝin per **kreto** (tion oni ofte faris al homoj, kiuj aspektis malsanaj, kaj tio signifis, ke ilin atendas pli serioza san-ekzameno). Bonsance por ŝi, iu konsilis al ŝi simple ŝanĝi

la flankon de sia supra vestaĵo kaj do kovri kreton: tiel ŝi evitis la pli seriozan san-ekzamenon.

Sed se oni tiel zorge kontrolis la korpan sanon – kio pri la sano mensa? Kaj kiel oni povis scii, ĉu oni estas mense sana aŭ ne, se la homo ne parolas la anglan lingvon – ja multegaj alvenintoj tute ne parolis ĝin. Tiun ĉi mian demandon respondis speciala ekspozicieto de strangaj lignaj aĵoj. Por kontroli, ĉu la homo, kiu ne parolas la anglan, estas mense sana aŭ ne, oni devis kun-meti partojn de iu aĵo por fari la tuton, ripeti movojn (aŭ frapojn), trovi simil-formajn objektojn kaj tiel plu en tre mallonga tempo.

Post la san-ekzameno la enmigrintoj devis iri al speciala pri-demanda ĉambro, kie enmigraj oficistoj demandis ĉiujn enmigrintojn 29 demandojn: la nomon (tre ofte la familinomoj estis angl-ig-itaj), deven-lokon, profesion, lokon, kien oni veturas kaj tiel plu. La bonŝanculoj restis sur Ellis nur 3-6 horojn.

Enmigrintoj – for!

La demando pri la regado de enmigrado en Usono estas same aĝa, kiel Usono mem. En la lando de enmigrintoj ĉiam estis tiel, ke la pli fruaj enmigrintoj ne estis aparte ĝojaj pri alveno de multaj aliaj enmigrintoj – aparte de aliaj landoj, ol ilia propra. Tiel iuj el la “pli fruaj” angloj ne volis enlasi irlandanojn, kiuj venis al Usono amase pro malsato en Irlando. Kaj poste iuj el la angloj kaj irlandanoj ne volis enlasi rusojn, hungarojn, polojn, ukrainojn, ĉinojn kaj tiel plu.

Komence de la 1900-aj jaroj la enmigraj oficistoj erare pensis, ke la “ora tempo” de la enmigrado jam pasis. Fakte, la enmigrado ĉiam kreskis ekde tiam, kaj en 1907 ĉirkaŭ 1,25 milionoj da novaj enmigrintoj eniris la landon nur en unu jaro, kaj oni devis aldoni al la enmigrejro novajn hospitalojn, dormejojn, kuirejojn ktp. Dum la tempo de la Unua Mondmilito, la kvanto de la enmigrintoj en Usonon malgrandiĝis, ĉar oni timis, ke malamikoj povas eniri la landon. Post la Unua Mondmilito Usono gajnis multe da povo, kaj en multaj landoj de la mondo aperis usonaj

ambasadejoj. Ekde tiam ĉiuj, kiuj volis enmigrigi Usonon, unue iris al usonaj ambasadejoj en sia lando kaj tie ricevis ĉiujn necesajn dokumentojn kaj ankaŭ faris san-ekzamenon. Sur la insulo Ellis devis resti ĉefe nur tiuj, kiuj havis iujn problemojn pri la dokumentoj. Komence de la dudekaj jaroj naciismaj grupoj provis malgrandigi la kvanton de enmigrintoj: en 1921 oni en-konduk-is limigon de la kvanto de enmigrintoj ĝenerale, kaj en 1924 oni eldonis leĝon, kiu povas enlasi (aŭ ne enlasi) enmigrintojn pro ilia nacia origino.

La historio de la insulo Ellis povas ŝajni kruela. Sed malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, ĝi estas ankaŭ historio de ĝojo, venko kaj liberigo – kaj ankaŭ la historio de homa bon-koreco. Ja multegaj usonanoj, aparte virinoj de help-organizoj, venis al Ellis speciale por helpi al novaj enmigrintoj: ili portis la manĝaĵojn, vestaĵojn, tradukis aŭ kuracis novajn enmigrintojn.

Ekster la ĉefa konstruaĵo de la enmigrejro estas “Muro de **Honoro**”, kiu havas nomojn de ĉiuj homoj, kiuj faris mon-donacon por honori ĉiujn enmigrintojn en Usonon. Nun sur tiu muro troviĝas pli ol 700 mil nomoj, kiuj “kovras” 400 jarojn da enmigrado en la Novan Mondon.

* Ŝolom-Alejĥem (1859-1916) – populara rusa juda (geografie ukrainia) verkisto, aŭtoro de jida literaturo.

** Viktorino (1819 [reĝino ekde 1837] -1901) – reĝino de Britio, kiu reĝis plej longe en la historio de Britio: 64 jarojn; ŝi donis la nomon al la tuta kulturo de vestado, konstruado ktp.



Enmigrantoj en la lando de enmigrantoj

Lige al la ĉefa temo de tiu ĉi numero de *KONTAKTO* kelkaj esperantistoj loĝantaj en Usono estis petitaj respondi la jenajn du demandojn: 1) Kiel vi taksas la nunan politikon de Usono rilate la landlimojn kaj la enmigradon? 2) Kiel, laŭ via opinio, oni devas aliri kaj trakti ĉi tiun aferon? Jen la respondoj de la demanditoj (la unua respondinto preferis esti anonima).

“Homoj eniras la domon de la najbaro tra la pordo, ne de sur la tegmento aŭ tra la rompita fenestro”



Anonimulo

1) Tio estas tre tikla afero. Se opinii, ke la vorto “enmigrado” en la demando rilatas ne al ĉiuj enmigrantoj, sed nur al la eksterleĝaj, neregistritaj enmigrantoj, do mi dubas, ke ekzistas vere speciala politiko rilate tion. Kelkaj leĝoj rilataj al tiuj demandoj ja ekzistas, sed ili ne estas aparte multnombraj por paroli pri iu “politiko” ĉi-sence. Nun multaj leĝfarantoj, eĉ la prezidento, volas krei novajn leĝojn aŭ elpensi iun novan manieron trakti la neleĝajn enmigrantojn, sed la celo de tiuj projektoj estas nek helpi al tiuj enmigrantoj, nek favori al la usonanoj. La celo estas nur plaĉi al la publiko por akiri pli da voĉoj en la venontaj voĉdonadoj.

2) Mi pensas, ke honestaj homoj eniras la domon de la najbaro tra la pordo, ne de sur la tegmento aŭ tra la rompita fenestro. Tiuj, kiuj eniras tra la fenestro meritas, laŭ mi, severan traktadon. Plej multaj neleĝaj loĝantoj de Usono devenas el malriĉaj landoj; ili venas en Usonon kun la celo perlabori monon. Ofte iliaj parencoj en la alia lando dependas de la mono, kiun la eksterleĝuloj sendas al ili – tial ili ĉiuj nemalofte plendas al Usono kaj al la prezidento de Usono, ili manifestacias surstrate, en la lernejoj

kt., petante la rajton labori en Usono. Sed kial ili ne plendas al sia propra prezidento kaj ne petas, ke la lokaj laborkondiĉoj estu pli bonaj, por ke ili ne bezonu riski siajn vivojn por kontraŭleĝe eniri Usonon? La problemo do originas ne en Usono, sed en la malriĉaj landoj mem.

Tamen, vidpunte de usonano, nura forpelo de ĉiuj neleĝaj enmigrantoj estas nedezirinda kaj eĉ danĝera. Se eblus morgaŭ resendi ĉiujn neleĝajn loĝantojn en iliajn devenlandojn, la tuta ekonomio de Kalifornio simple paneus! La samo validas por kelkaj aliaj ŝtatoj, eble por tuta Usono, ĉar la neleĝaj enmigrantoj plenumas en la usona socio ege multajn taskojn. Ekzemple, antaŭ kelkaj monatoj oni plimalfaciligis la eniron de “najbaroj” en Kalifornion. Rezulte multaj kampoj restis nerikoltitaj, ĉar ne estis sufiĉe da laborantoj. Pro tio, ke la kampoj ne plu estis prilaborataj, suferis ankaŭ leĝaj laborantoj. La problemo do estas ege malfacila kaj bezonas tre ekvilibrigitan solvon.

“Mi preferus honestan politikon”



Robert Read, Usono

1) La nuna politiko estas malhonestaj kaj hipokrita. La registaro tre malofte utiligas la ekzistantajn leĝojn kontraŭ la dungado de neleĝaj laborantoj. Tiaj neleĝaj enmigrantoj ofte laboras kiel infan-vartistoj aŭ helpas pri la hejma mastrumado; ankaŭ farmistoj preferas dungi enmigrantojn por pagi al ili malpli multe. En ĉiuj similaj okazoj oni punos ne la dunganton, sed la dungiton (plej ofte per forpelo el la lando). Oni penas klarigi la dungadon de neleĝaj laborantoj, dirante, ke “usonanoj ne volas labori en tiaj postenoj”; tamen,

laŭ mi tio egalas al “ni ne volas pripagi tian laboron sufiĉe bone por allogi usonanojn”.

2) Mi preferus honestan politikon, kiu ĉesigas la kontraŭleĝan enmigradon per procesoj kontraŭ la dungantoj. Kompreneble, oni devas antaŭvidi la eblecon de laŭleĝa enmigrado, kaj ni devas havi malferman kaj liberan politikon, kiu traktus enmigradon el ĉiuj landoj sammaniere.

“La nunan realan usonan politikon rilate la landlimojn kaj enmigradon mi taksas eklektika kaj hipokrita”



Aleksandro Shlafer, Rusio/Usono

1) Kiel enmigranto (mi naskiĝis en Rusio, sed jam 14 jarojn mi loĝas en Usono, kies civitano mi estas ekde 1999) mi admiras honestecon, justecon kaj bonkonrecon de multaj ordinaraj usonanoj, kiujn mi persone renkontis, kaj relativan mankon de ksenofobio kaj individua korupteco en Usono. Tamen la nunan realan usonan politikon rilate la landlimojn kaj enmigradon mi taksas eklektika kaj hipokrita. Mi ja konscias, ke tio okazas sub la premo de politikaj kaj ekonomiaj fortoj, kiuj estas interesitaj en malmultekosta kaj facile ekspluatebla laborforto. Tamen, kiel ŝtata politiko tio, laŭ mi, estas miopa kaj malsagaca. Min konsternas la situacio, kiam rompo de leĝoj iĝas kutima afero. Min ofendas la diskriminacio, kiun mi kaj miaj proksimuloj kaj konatoj persone spertis: tiuj, kiuj obeas la leĝojn, ofte estas en malfavoraj kondiĉoj. Bedaŭrinde, la ĝenerala publiko en Usono ne konscias pri multaj aspektoj de la problemo aŭ facilanime kredas al unuflanka propagando. En tiutemaj disputoj oni malofte

distingas laŭleĝan kaj kontraŭleĝan enmigradon, kaj ankaŭ trosimpligas kaj misprezentas ĝiajn ekonomiajn kaj politikajn aspektojn. Malgraŭ la graveco de tiu ĉi problemo por konsiderinda kvanto de homoj, ĝi estas relative malgrava por plejparto de usonanoj.

2) Kiel civitano mi preferus, ke la agoj de la registaro estu konformaj al la leĝoj kaj ke oni obeu la leĝojn. Tion eblas atingi per ŝanĝo de la leĝoj aŭ per ŝanĝo de la agoj, aŭ per ŝanĝo de ambaŭ. Mi tamen ne tro esperas, ke tio baldaŭ okazos.

“Mi pensas, ke ni devas fari amnestion al ĉiuj nunaj sendokumentuloj”



Ĝeremio Aldrich, Usono

1) La nuna afero pri la sendokumenta enmigrado en Usonon estas vere duflanka. Oni diras, ke estas ĉirkaŭ 12 milionoj da sendokumentuloj. Oni ne volas deporti (forpeli) la nunajn laboristojn, ĉar tio fuŝigus la ekonomion, sed oni ankaŭ ne volas brakumi ilin, ĉar ili ja faris krimon, enirinte la landon kontraŭleĝe. Mi ofte aŭdas la frazon “Ĉu vi ne komprenas ke ili estas laŭdifine krimuloj?” el la buŝo de kontraŭuloj de la sendokumentuloj. Sed fakte multaj el ili simple ne sukcesas eniri la landon laŭleĝe, dum ili urĝe bezonas plibonigi la bonstaton de siaj familioj.

2) Mi pensas, ke ni devas fari amnestion al ĉiuj nunaj sendokumentuloj (ili ne devus timi pri si, se ili sciis, ke ili estos pardonitaj), tamen tio ofendus nian nacian principon de “regado per leĝoj”. Eble, se la neleĝaj enmigrantoj pagus monpunon, por multaj usonaj civitanoj estus pli facile pardonitaj ilin.

“Creative Commons” en Esperanto: Paŝeto al plia libereco

Yves Nevelsteen, Flandrio (Belgio)


Kiam Chuck Smith kaj Judith Meyer lanĉis la interkonan retejon Amikumu.com, kelkaj homoj eksentis la bezonon havi la informojn pri “Creative Commons” en Esperanto. Chuck sendis la retmesaĝon al kelkaj respondeculoj pri la afero, la retejestro favore respondis kaj disponigis la interretan traduksistemon. Mi tradukis la permesilojn, kelkaj spertuloj provlegis la tuton kaj jen: en la oficiala retejo de “Creative Commons” jam ekzistas ĉiuj leĝo-konformaj permesiloj en nia lingvo!

Kio estas “Creative Commons”?

“Creative Commons” (mal-longe “CC”, tradukebla el la angla kiel “Krea Komunaĵo” aŭ “Kreiva Komunumo”), estas neprofito organizaĵo celanta disponigi al la publiko laŭeble multajn kreajn verkojn sur stabila leĝa bazo. La projekto estis iniciatita en la jaro 2001 fare de i.a. Lawrence Lessig (vd. sube) kun la celo proponi pli liberan sistemon de aŭtoraj rajtoj. “Creative Commons” zorgas pri aro da internaciaj projektoj por traduki kaj adapti anglalingvajn kaj uson-jurajn rajtigilojn al aliaj lingvoj kaj jursistemoj.

La fono kaj historio

En ĉiuj landoj ekzistas striktaj leĝoj pri kopirajto, kiuj malpermesas kopii literaturan verkon, bildon, muzikon ktp, sen antaŭe akiri la rajton por tio (kutime kontraŭ pago). Aliflanke, multaj verkistoj kaj artistoj ege deziras,



ke iliaj verkoj estu kopiataj kaj konataj de la publiko, sen iu ajn kompenso. La disvastiĝo de interreto multe pliakrigis la kontraston inter regulado kaj libereco.

Antaŭ kelkaj jaroj en pluraj landoj la daŭro de la kopirajta protekto estis konsiderinde pli-longigita. En Usono en iuj okazoj ĝi povas atingi 70 jarojn post la morto de la kreinto. El tio rezultas, ke pro kopirajtaj problemoj fojfoje ne plu eblas reel-doni valorajn verkojn. Usonaj kontraŭantoj de la troa protekto procesadis pri tio (la tiel nomata kazo Eldred kontraŭ Ashcroft). La protagonisto en tiu proceso estis Lawrence Lessig, profesoro de Stanford Law School kaj arda favoranto de libera kulturo.



La verdikto de la usona supera kortumo ne kontentigis Lessigon, kaj en la jaro 2001 li fondis la asocion “Creative Commons”. En 2002 CC aperigis sian unuan aron da rajtigiloj.

Rajtigiloj

La CC-rajtigiloj estas senpage haveblaj bildetoj kaj tekstoj, per kiuj la aŭtoro informas la leganton, ke lia rete aperigita verko estas tute libere uzebla aŭ ke estas iuj kondiĉoj priatentindaj. Se ekzemple estas limigoj, la bildeto enhavas la tekston “Iuj rajtoj rezervitaj”. Alklakante la bildeton, la leganto de la paĝo alvenas al alia paĝo, en kiu la kondiĉoj estas pli detale klarigitaj per teksto kaj aliaj bildetoj, ekzemple kun la surskribo BY (la devo mencii la aŭtoron en la okazo de reuzo) aŭ kun trastrokita dolar-signo (malpermeso de komerca uzo).

La originaj CC-rajtigiloj estis bazitaj sur usona leĝaro kaj ne nepre havas juran validon en aliaj landoj. Tial ili estas adaptataj al la leĝaro de aliaj landoj kaj tradukataj al lokaj lingvoj. En la ĉefpaĝo de la projekto jam eblas elekti el kelkdeko da jurisdikcioj.

En la sama retpaĝaro estas ankaŭ gvidilo, kiu helpas elekti la deziratan rajtigilon kaj meti la referencan bildeton al nove kreita paĝo.

“Creative Commons” kaj Esperanto

Ekde marto 2007 ankaŭ la esperantlingva traduko de la laŭleĝaj permesiloj de “Creative Commons” estas havebla en la oficiala retejo. Ĉiuj tekstoj de la internacia sendependa magazino *Monato*, kiuj estas interrete publikigitaj, nun havas la CC-rajtigilon. La interkona retejo Amikumu.com donas al vi la eblon indiki la CC-permisilon ĉe la alŝutataj fotoj.

Al la fotoj, kiujn vi alŝutas al Vikipedio, mi konsilas aldoni la ŝablonon {{PD}}, indikante ke temas pri senkopirajta publika havaĵo. Sen tia indiko la alŝutita materialo riskas esti forigita!

<Rete>

http://creativecommons.org/license/index_html?lang=eo – “Creative Commons” en Esperanto

Esprimu vin libere



Chuck Smith, Usono/Germanio kaj Judith Meyer, Germanio

Imagu la mondon, en kiu vi povas ekkoni absolute ĉiujn esperantistojn kaj interŝanĝi

ideojn kun ili ĉiuj. Ĉu neimageble? Nu, tion ni provas doni al vi ĉe Amikumu.com. Dank’ al ĝi oni povas trovi geamikojn tra la tuta mondo laŭ la indikita loko aŭ laŭ la intereso kaj

sendi mesaĝojn al ili. Ĉagrenas nin la fakto, ke la interreto estas tiel oportuna loko por esprimi ĉion, sed ofte oni bezonas tre profundajn teknikajn sciojn por fari tion. Ni esperas, ke per nia laboro ni povos plifaciligi ĉies komunikadon, eĉ sen ajnaj teknikaj spertoj. Nun oni povas esprimi sin per forumo, babilejo, privataj mesaĝoj kaj bildoj. Tiel vi povas vidi kaj sperti la mondon per aliaj okuloj.

Alia granda utilo de Amikumu estas la eblo trovi lokajn nekonatajn esperantistojn. Multaj esperantistoj ne tiom entuziasmas pri Esperanto por pagi kotizon

kaj aliĝi al landa aŭ tutmonda asocio, kaj ĝuste tiuj nekonektitaj homoj bezonas trovi homojn loke por povi eksperti la buntecon de la mondo en Esperanto. Alia problemo tamen estas, ke tiuj homoj, kiuj estas bone ligitaj al la movado, ne vidas la utilon de Amikumu, ĉar ili jam havas multajn kontaktojn en Esperantio, sed ni spertis ke eĉ tiuj sukcesas trovi pli da esperantistoj en sia ĉirkaŭaĵo per Amikumu. Do, vi nun liberigas elektojn, ĉu vi volas registriĝi aŭ ne, kaj ni esperas, ke jes!

Vizitu www.amikumu.com – trovu amikojn kaj plii!

LA NOVA HOMARO

Libero de elekto

M. Saniljević, Rusio

Libero estas la eblo spite al la propra egoisma naturo fari la decidojn, bazitajn sur la absolute alia principo, alia formulo, alia algoritmo. La sfero de tiuj sendependaj decidoj troviĝas ekster nia egoisma naturo.

Dum la tuta historio de la homaro la homoj serĉas liberon. Pri kio ĝuste ni povas esti liberaj? Kio estas tiu sklaveco, de kiu la homaro penas liberiĝi? Ĉu eble venis la tempo klarigi, kie ni vere povas elekti, kaj kie ni estas devigitaj agi aŭtomate?

Ĉiu el ni havas difinitan aron de informaj datumoj (genoj), kiu difinas ĉiaspecajn inklinojn: al muziko kaj sporto, al altruismo kaj ŝtelo. De tago al tago sciencistoj ricevas pli kaj pli da informo, kiu montras, ke ni estas absolute neliberaj en niaj agoj. Ekkonsciinte tiun fakton, la homo povas komenci la serĉon de libero.

Ni vivas konforme al du determinaj faktoroj. Ili estas la esenco kaj programo de evoluo de tiu esenco. La esenco estas la datumoj, antaŭmetitaj en nin (sekso, karakteraj ecoj, deziroj ktp). Krom tio, de ekstere al ni efikas ankoraŭ du faktoroj – la socio (t. e. nia ĉirkaŭaĵo) kaj la programo de evoluo de tiu socio. Do, tiuj kvar parametroj difinas absolute ĉion, pri kio ajn ni pensus, kiujn ajn novajn sciojn ni akirus.

Kiam mi ekkonscias min vivanta en ĉi tiu mondo, ŝanĝi ion jam ne eblas.


Mi naskiĝis en la familio, kiun mi ne elektis, oni disciplinis min per difinita maniero, sen demandi mian konsenton pri tio; mi ricevis iun edukon aŭ ne ricevis ĝin, kio ankaŭ preskaŭ ne dependis de mi. T. e., la samaj kvar faktoroj difinis, kia mi kreskis. Kie ja estas la spaco por libera elekto?

Nia egoisma naturo estas la konstante kreskanta en ni deziro ricevi ĝuon koste de ĉiuj kaj ĉio, kaj ene de ĝi ni estas absolute dependaj. La procezo elekti optimuman varianton de konduto por kiom eble maksimuma kontentigo de siaj bezonoj, okazas en la homo senkonscie, aŭtomate, ĝin ne eblas kontroli.

Libero estas la eblo spite al sia egoisma naturo fari la decidojn, bazitajn sur la absolute alia principo, alia formulo, alia algoritmo. La sfero de tiuj sendependaj decidoj troviĝas ekster nia egoisma naturo. Restante sub ĝia regado, ni perdas la eblon de libera elekto. Transformi la genan informon ni ne kapablas, same kiel estri la procezon de evoluo, kontroli ĝin. Ankaŭ ŝanĝi la leĝon de efiko de la socio al la individuo ni ne povas. La sola afero, kiun ni kapablas estri, estas la elekto de la ĉirkaŭaĵo, kies opinionon ni konsentas atenti. Temas ne pri la “fizika ĉirkaŭaĵo”, kiu, same kiel ĉio alia en nia mondo, estas difinita dekomence, sed, ni diru, pri la “ĉirkaŭaĵo de influo”. La homo ekzistas en fiksa ligo al la aliaj homoj, kiu estas foje difinita kaj neŝanĝebla. Liaj rilatoj kun la ĉirkaŭaĵo baziĝas sur reciproka influo, tamen la

homo havas la eblon konscie elekti la ĉirkaŭaĵon, por ke ĝi difinu liajn dezirojn, pensojn kaj agojn certmaniere. Se la ĉirkaŭaĵo progresigos nian eliron el la egoisma naturo, tiuokaze helpe de ĝi ni malkovros en ni tiun spacon, kie ni povos fari liberajn decidojn.

Trad.
Konstantin
Aleksandrov



Por la Nova Homaro!

Konstantin Aleksandrov, Rusio

“La Nova Homaro” estas nekomerca scienc-kleriga projekto, lanĉita en la jaro 2004 fare de grupo de sciencistoj kaj sociaj agantoj el diversaj landoj, kiuj decidis investi siajn fortojn en kreadon de diversaj informfontoj (libroj, ĵurnaloj, retejoj kaj aliaj komunikiloj). En la projekto partoprenas tiuj, por kiuj kun plena evidenteco malkovriĝas la simpla vero, ke ĉiuj ni, sendepende de nia etna aparteno, aĝo, konfeso, socia stato, estas subordigitaj en nia evoluo al la sama leĝo. Sciencistoj de diversaj disciplinoj surbaze de antikvaj fontoj kaj lastaj esploroj de la moderna scienco pruvas, ke ĉiuj elementoj de la naturo, krom homo, estas nedisŝireble ligitaj en unu sistemon kaj estas en ekvilibro.

La sama kunligo ekzistas ankaŭ en la socio. Ĉiu el la homoj pli aŭ malpli frue eksentos sin malgranda parteto de la tuta homaro kaj devos pensi kaj zorgi pri ĉiuj homoj, kiel pri partoj de sia korpo. Tio ŝajnas al ni fantazio, sed aŭ la naturo kondukos nin al tiu stato pere de vojo de suferoj, aŭ ni konscie faros tiun decidon.

Ekde februaro 2007 enkadre de la projekto estas eldonata la samnoma ĵurnalo en la rusa lingvo eldonkvante de pli ol 100 mil, nun preparata por aperigo en la angla, la germana kaj la hispana lingvoj. Hodiaŭ ni ĝojas la unuan fojon prezenti ĉi tie niajn materialojn al la esperantlingva publiko, kaj ni esperas pri via reeĥo. Ni prezentas al via atento la artikolon “Libero de elekto” el la unua numero de la ĵurnalo “La Nova Homaro”.



Limigo de la libereco: Ĉu nun ankaŭ fare de liberemuloj?

Martin Lavallée, Kanado

Strangaj aferoj okazas en la bahaa komunumo. Ĉu oni povus imagi, ke, ekzemple, la papo penos kopirajti la vortojn “Kristo”, “kristanismo” kiel var-markojn? Ke islamanoj kontraŭos la uzadon de la vorto islamo fare de neislamanoj? Tiaj ekzemploj ŝajnas neeblaj. Tamen io simila okazas en Usono: la bahaa organizaĵo de la urbo Wilmette minacas aliajn bahaanojn per proceso pro simila kaŭzo! Estas vera paradokso, ke la bahaismaj gvidantoj plendas pri manko de libereco, dum ili mem negas ĝin rilate la malplimultojn ene de la bahaa movado.

La Nacia Spiritita Asembleo de la bahaanoj de Usono (NSA), kies sidejo estas en Wilmette, ŝtato Ilinojso, petis la Usonian Distrikтан Kortumon de la Norda Distrikto de Ilinojso juĝi la anojn de malpli grandnombraj bahaaj organizoj (la ortodoksa Bahaa Kredo kaj la Bahaanoj sub la Kondiĉaro de la Interligo – du disaj kaj diversaj memstaraj institucioj). La kialo, laŭ NSA, estas, ke ili malrespektas la verdikton de juĝproceso, kiun iama NSA-gvidanto gajnis antaŭ 40 jaroj kontraŭ rivala bahaa asocio.

En la dokumentoj disponigitaj al la kortumo la sesan de decembro 2006 NSA asertas, ke la anoj de la nunaj malpli grandaj bahaaj grupoj

devas respekti tiun verdikton de 1966. Sen havigi iun ajn precizan informon pri la maniero, laŭ kiu la malpli grandaj organizaĵoj damaĝas la pli grandan, NSA opinias ke la re-paĝoj de la pli etaj organizaĵoj faras neripareblan damaĝon al NSA.

La baza argumento de NSA estas tiu, ke la anoj de la malpli grandaj grupoj malrespektas la laŭdirajn kopirajtojn de NSA pri la markoj koncerne la nomon “bahaa” kaj la religian simbolon de “La Plej Granda Nomo”, kaj ĝi deziras ke la kortumo faru verdikton, kiu malpermesu al la membroj de la aliaj organizoj uzi la laŭdire NSA-ajn “markojn”. Klaras, ke per tio NSA penas estingi la aktivecon de tiuj bahaanoj, kiuj apartenas al la aliaj bahaaj organizoj.

Tiuj anoj de la malpli granda bahaa grupo, kiu nomas sin “ortodoksaj bahaanoj”, por defendi sin asertas, ke la markorajto de la Wilmette-a NSA pri la uzo de “La Plej Granda Nomo” egalas al registrado de la marko de la kruco, farita de iu kristana konfeso kaj sekve, ili aldonas, tio signifus ke neniu alia kristana konfeso povus uzi tiun simbolon por sia agado, nek por siaj kontaktoj kun la aliaj.

Plie, la ortodoksaj bahaanoj pledas, ke la nomo “bahaa” estas komunua kaj ĝi ne povas esti ekskluziva propraĵo de nur unu organizo. Ili diras ke, samkiel la vortoj “kristano” kaj “isla-



Konata en Barato kiel la Lotus-Templo, la bahaa domo de adorado allogas averaĝe 3,5 milionojn da vizitantoj ĉiujare

mano” kunligiĝas kun la fideluloj de Kristo kaj Mohamedo respektive, tiel la nomo “bahaa” ligiĝas kun la fideluloj de Bahá'u'lláh, kiun ĉiuj bahaanoj agnoskas la plej lasta Profeto de Dio.

Dum pli ol 35 jaroj la ortodoksaj bahaanoj uzis la nomon “bahaa” en siaj ĵurnalaj kaj magazinaj reklamoj kaj en la telefonlibroj “flavaj paĝoj”, kaj samperiole NSA neniel agis por la apliko de la verdikto, kiun ĝi nun uzas por atingi tribunalan deadmonon kontraŭ la anoj de la malpli grandaj grupoj. Se NSA sukcesos en siaj klopodoj malpermesi iliajn agadojn, la ortodoksaj bahaanoj konkludos, ke por ili la Unua Amendo de la Usona Konstitucio (garantianta la liberecon pensi kaj praktiki sian propran religion) ne plu validas. Estas vere strange, ke ĉi-foje la limigo de la libereco venas de la movado, kiu mem pledas por la libereco...

<Rete>

<http://www.orthodoxbahai.com> (angle)



Pli ol nenio, kant-albumo de Martin Weise, miksoformata disko, 38 min., 12 titoloj, 1 mp3-dosiero kaj 2 mpg-formaj videodosieroj, tekstolibreto, eld. Vinilkosmo, 2007.

Paŭlo Moĵajev, Ukrainio

Post kiam la rok-bando “Persone”, verŝajne la plej alt-nivela muzika kolektivo de Esperantujo, aperigis en 2002 sian dume lastan albumon “Sen”, ĝi foriris en la ombbron, por granda bedaŭro de siaj fanoj kaj ĉiuj ŝatantoj de bona E-muziko. Feliĉe, komence de tiu ĉi jaro “Vinilkosmo” eldonis la solo-albumon de Martin Weise, la ĉefa motoro de “Persone”. Malgraŭ

Certe pli ol nenio

tio, ke la albumo laŭdifine estas solista, do ne estas rekta posteulo de la “Persone”-tradicioj, ĉiuj ŝatantoj de la bando povas simple fermi la okulojn pri tiu fakto: la albumo “Pli ol nenio” sonas tute “Persone”-ece kaj, kompreneble, same altnivele.

Kaj tio ja ne estas stranga: la tekstojn kaj muzikon aŭtoris la homo, kiu ja faris tion antaŭe; ankaŭ la voĉo de la ĉef-kantisto – alteta kaj iom rompita – restis perfekte la sama.

Eĉ la ĝenerala etoso de la albumo laŭas la tradiciojn de “Persone”; malgraŭ tio, ke la kantoj estas sufiĉe variaj ritme, tempe kaj eĉ stile (dominas tamen bona, ekvilibrigita kaj mezaŭta roko), ilin ĉiujn superkovras ioma spleno kaj morna tono, senteblaj ankaŭ en la antaŭaj albumoj de la bando. Ne temas pri pesimismo, temas pli verŝajne pri iu introverteco. Unuvorte, la ĝenerala sono de la albumo rememorigas la antaŭan “Persone” tuj kaj senrezerve.

Ankaŭ la tekstoj prezentas nenion specialan kompare al la antaŭaj tekstoj de “Persone”.

La arta nivelo de la tekstoj estas eĉ se ne elstara, tamen certe pli alta, ol tiu de averaĝaj Esperantaj kanto-tekstoj. La rimoj kaj la fraz-konstruoj simplas kaj ĝlatas; nur unu lingva malĝataĵo – foj-de-foja transitiva uzado de “manki” (“min ne mankas la malcerto”, “mono mankas nin”) – iom tranĉas la orelon. Enhave la tekstoj riĉas je filozofumado kaj “plendado pri la malfacilaĵoj” (laŭ la aserto de la aŭtoro mem en unu el la videoj), tamen tiuj lamentoj neniam iĝas tro trudaj aŭ tro simbolriĉaj kaj malfacile kompreneblaj.

Por plifirmigi la konstaton, ke la solo-albumo de M. Weise simple daŭrigas la tradiciojn de “Persone”, eblas aldoni, ke minimume du kantoj el ĉi albumo jam sonis en aliaj albumoj (temas pri “Pli ol nenio” el “Sen” kaj “Vivo duras, sed vi molas” el “Vinilkosmo-kompil’ 2”); eble iuj aliaj kantoj jam sonis ie, simple mi ne rekonis tion; krome, al unu kanto kontribuis kontrabaso alia “Persone”-ano Anders Grop. Apenaŭ necesas aldoni, ke la son-kvalito de ĉiuj registraĵoj

estas ege bona, laŭ ĉiuj tradicioj de la bando.

Aldone la disko havas mp3-dosieron, kiu prezentas la kanton “Homoj kiel mi” remiksitan de Roĝer Borĝes. Tamen vera atuto estas la 2 video-dosieroj (ĉu de nun ĉiu disko de Vinilkosmo havos ilin?): la unua, kvar-minuta, prezentas Martinon dum KEF-2005; la dua, preskaŭ ok-minuta, prezentas la muzikiston dum registrado de la albumo en Vinilkosmo-studio. Ambaŭ videoj estas informo-riĉaj (Martin rakontas pri si, pri sia laboro ktp.) kaj sufiĉe dinamikaj; grumble mi rimarku, ke la voĉ-laŭteco povus esti iom pli granda.

La disko do riĉas je ne nur sono, sed ankaŭ vida enhavo.

Oni sen ajna dubo agnoskos, ke la disko vere estas “pli ol nenio”; ĝi pli ol digne reprezentas la Esperantan muzikon. Konsiderante, ke la reunuiĝo de “Persone” estas malverŝajna (nu, almenaŭ Martin mem asertas tion en la videa intervjuo), ĉiuj ŝatantoj de “Persone”, de roko ĝenerale aŭ de bonkvalita Esperanta muziko entute ne maltrafu la okazon havigi al si tiun albumon.

“Por ĉiu irakano, kiu mortas per bomboj, naskiĝas kelkoble da teroristoj”

Etsuo Miyoshi, Japanio

“Terorismo okazas pro fuŝo de mondaj politiko, ekonomio kaj socio: forcejo de mizereco kaj maljusteco. Por fari landojn pacaj gravas la subtenado de la internacia socio”. Tio estas diraĵo de profesoro Makoto Iobeki, japana renoma politik-sciencisto. Antaŭnelonge profesoro Makoto Iobeki, kiu ankaŭ estas rektoro de japana Defenda Universitato, pridubis la kontraŭterorisman agadon de Usono, kiu sekvas la principon “okulon por okulo”. Ja forigi terorisman per milita agado ne eblas: oni devas unue ŝanĝi la mondan politikon, ekonomion kaj socion...

La universalaj normoj kaj la universala povo de dolaro

Ni komencu de la tiel nomata Internacia Organizo pri Normigado (ISO), kiu postulas certajn komercajn kaj industriajn normojn por povi vendi la varojn. Kiam nia kompanio anoncis, ke ni ne sekvas la ISO-normojn, kompanioj en evoluantaj landoj ne aĉetis niajn varojn. Do mia kompanio *Swany* devis finfine akiri ISO-normojn, uzante multe da tempo kaj mono. Laŭ unu fama japana kompaniestro: “ISO estas nur malŝparo de papero kaj tute ne indas”.

Iam mi spertis interesan okazaĵon en ĉina kamparo. Kutime tie la fluanta akvo ne funkcias en la domoj post la oka vespere, pro tio mi petis la deĵorantinon porti 10 potojn da varma akvo en la ban-kuvon. Mi serĉis dank-monon en mia poŝo, sed tie estis nur bileto de mil enoj (ĉ. naŭ usonaj dolaroj). Kvankam mi sentis, ke tio eble estas iom tro por dankmono, mi tamen donis ĝin. Ŝi multfoje turnis ĝin pritaksante, sed ne volis preni. Kiam mi serĉis plian fojon, el la monuj-fundo aperis unudolara bileto, kiun mi enmanigis al ŝi. Ŝi redonis la enojn kaj kontente foriris kun unu dolaro. Anstataŭ priridi ŝian nescion, mi sentis min tre trista: jen kian povon sukcesis krei la dolar-mito...

Kial ne patentigi la Teron?

La maljusteco, kiu venas de la evoluantaj landoj – unuavice Usono, – sentiĝas sur la tuta ter-globo. Ekzemple, ni prenu la nunan patentan sistemon. La teknologia esplorado gvidata de evoluantaj landoj estas absolute

neimagebla por homoj en evoluantaj landoj: ekzemple, en multaj afrikaj landoj oni apenaŭ konas akvo-pumpilon, jam ne parolante pri hibrid-motoroj, hidrogena energio, gen-rekombinado, nov-medicina esplorado ktp. Fakte, en ĉiuj kampoj la fendo inter riĉaj kaj malriĉaj landoj ĉiam pli kaj pli larĝiĝas. Mi pensas, ke la ŝanco de memstarigo por evolu-landoj estas tute barita de la nuna patenta sistemo. Tiu situacio garantias enorman profiton al kompanioj en evoluantaj landoj kaj bremsas disvolvigon de ĉiuj aliaj.

Ĉio ĉi estis bone bildigita en la furorega libro “Se la mondo estus vilaĝo”, kiu alegorie prezentas la mondan loĝantaron kiel 100-homan vilaĝeton, la ses plej riĉaj personoj de la urbeto estus usonanoj kaj ili posedus 60% de ĉiuj riĉaĵoj. Al 20% de la loĝantoj mankus nutraĵoj, 1% preskaŭ mortus kaj 14% ne povus legi. Por malmultigi maljustecon kaj mallegecon, la homoj de evoluantaj landoj devas konsenti malaltigi sian vivnivelon – kaj ankoraŭ kompati kaj helpi la aliajn homojn.

Komercistoj de morto

Maljusteco de potencaj landoj estas ne nur ekonomia. Elstara ekzemplo de tio estas la provoka anticip-atako de Usono al Irako sen UN-rezolucio, t.e. sen la monda konsento. Se oni permesus anticip-atakon, Nord-Koreio kaj Irano povintus jam delonge ataki Usonon. Per la japana atako al Pearl Harbor komenciĝis la pacifika milito, kaj tio estas ĉizita en usonajn mensojn kiel tipa ekzemplo de malnobla anticip-atako. Sed pro la propra agado ili blindiĝis. Ja la atakita lando tute ne rilatas al la teroro de 9/11. La usona registaro kredigis, ke Irako havas amasdetruajn armilojn, kvankam fakte ĝi ne havis ilin. Estis jam murditaj kelkdek miloj da senkulpaj mizeruloj, dekoj da homoj mortas ĉiutage, kaj en la lando furiozas interna milito kun ĉen-reakcia teroro. S-ro Nelson, usona soldato dum la Vjetnama milito, kiu gvidis al forta kontraŭmilita movado, avertis: “Por ĉiu irakano, kiu mortas per bomboj, naskiĝas kelkoble da teroristoj”.

Oni ne pretervidu, ke malantaŭ tiu ĉi tragedio troviĝas potenculoj konspirantaj kun la celo profiti per milito. La usona milit-industrio fakte enspezas neimageblajn sumojn per ĉiu milito – ĉu en



Monumento al Saddam Husejn en Bagdado, rompi-ta tuj post la komenco de la usona okupacio

PETER RIMAR

Vjetnamio, ĉu denove en Afganio, kaj laste en Irako. Laŭ la Internacia Pac-Esplorojo en Svedio, la mondaj armil-elspezoj en la jaro 2005 kreskis je 3,4% kompare al la pasinta jaro kaj atingis unu trilionon 118 miliardojn da usonaj dolaroj: tio estas 1,5-oble pli ol la japana jara buĝeto. La usonaj armeaj elspezoj elstaras. Ili kreskis je 50% dum la pasintaj kvin jaroj kaj okupas duonon de la tutmondaj armil-elspezoj. Nu, la eksportado de militiloj estas regata de Rusio ĉekape, sekve Usono, Francio, Germanio kaj Britio – la grandaj gvidaj landoj estas ĝenerale komercistoj de morto.

Perforto alvokas perforton

Inazo Nitobe, la vic-ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj – la antaŭanto de UN – dum la 1920-aj jaroj volis fari Esperanton internacia lingvo. Kvankam li sukcesis persvadi 44 membro-landojn, finfine la afero pro la fortega kontraŭo de Francio finiĝis. Li prelegis antaŭ la dua mondmilito, ke “komunismo kaj milit-reĝimo pereigos Japanion”, kaj ĝuste laŭ lia diro Japanio poste estis detruita per milit-reĝimo...

Japanio daŭre gardis pacon laŭ la instruo de la milita malvenko. Sed per la realisma opinio, ke “ni ne povos vivi sendepende de Usono”, nun ekzistas tendenco ŝanĝi la japanan pac-konstitucion. Nun oni skuas la idealon de Japanio, per kiu ĝi eterne forlasis militon kiel manieron solvi internaciajn konfliktojn. Ĉu ni do implikiĝos en la militon laŭ la volo de nura plejforta Usono?.. Mi senhezite neas! Perforto alvokas perforton. Venĝo okazigas venĝon. Mi pensas, ke por forigi tiun ĉi

diablan cirkolon, Japanio antaŭkuru la mondon kaj strebu al kompleta militil-neniigo.

Tuj post la Dua Mond-Milito en la jaro 1945, majstro Onisaburo Deguĉi* aŭguris: “Japanio havas novan mision por la monda paco. Kiam militiloj estos tutmonde abolitaj, vera monda paco realiĝos unuafoje, kaj nun proksimiĝas tiu epoko”. Bedaŭrinde, la mondo ŝajnas kuri en la kontraŭan direkton, sed ĉu tio ne estas homa prudento korekti la realon almenaŭ iomete direktan al idealo? La angla ĉef-ministro Blair [bler], same kiel la ĉefministroj de Italio kaj Hispanio, jam demisiis (aŭ evidente demisiis), ĉar pro ilia apogo al la Irak-milito ili perdis la fidon de la popolo. Tio diras ion ankaŭ al ĉiuj ni...

Ni, esperantistoj, strebas al ideala mondo de paco kaj justeco per nia maniero: ni batalas kontraŭ lingva hegemonio. Kaj ni memoru: ni ĉiuj havas la povon ŝanĝi la mondon: fari ĝin pli paca, pli tolerebla, pli humana kaj pli justa!

* Onisaburo Deguĉi (1871-1948) – kunfondinto de Oomoto; li lernis Esperanton kaj enkondukis ĝin en Oomoton.

En *KONTAKTO* 217 (2007:1) en la “bumerangon” “Jam alia Esperantiginta Ekotopio” enŝteligis malĝustajo. La fakta kvanto de la Ekotopipartoprenantoj, kiuj ĉeestis la plej amasan E-lecionon, estis ĉ. 60 (ne 200, kiel erare estis menciite). La redakcio pardonpetas pro la miso!

Ĉu nura koincido?

Anguleto

Aneta Ubik, Germanio/Argentino

Strange, ĉu ne? Tiu Anguleto troviĝas ĝuste sur *tiu ĉi* paĝo, ne sur iu alia paĝo. Ĝi povus kaŝiĝi sur la paĝo 3 aŭ 7, sed ne estas tiel. Ĝi troviĝas sur la paĝo 15.

La momento, kiam vi legas ĝin, povus esti alia momento, ekzemple post duonhoru – sed ne! Vi faras tion *nun*. Iu alia homo povus legi tiun numeron de *KONTAKTO* en tiu ĉi momento en tiu ĉi anguleto de la revuo – sed ne! Estas *vi*, kiu faras tion *nun*. Eble vi ripetos tion morgaŭ, sed ankaŭ tiam... vi faros tion *en la momento*. Mistere, ĉio havas sian perfektan momenton.

La miliardoj de atomoj, el kiuj konsistas la papero kaj inkjo de ĉi tiu Anguleto renkontiĝis ĝuste en ĉi tiu konstelacio. Povus esti aliaj atomoj – sed ne! Estas tiuj, kiujn vi tenas en la mano *nun*. Vi mem estas unika en tiu ĉi momento. Kial?

Nu, tute simple. La korpo konsistas el miliardoj da atomoj kaj informoj, kiuj kolektiĝis kaj ordiĝis ene de vi. Ili parte ŝanĝiĝas senĉese. La atomoj estis dissemintaj en la tuta mondo – nur pensu pri la manĝo ĉiutaga, kiu originas el foregaj landoj kaj kolektiĝas en la korpo.

Iam niaj korpoj estis stela polvo. Iam ili reĝos stela polvo. Same kiel tiu ĉi *Anguleto*.

Korespondi deziras

Anonce

Saluton! Mi estas Hassano, esperantisto el Burundio. Mi lernis Esperanton en 2003 per du libroj, kiujn mia amiko el Tanzanio sendis al mi. Nun mi ŝatas kaj preferas Esperanton al aliaj lingvoj. Mi instruas Esperanton kaj fondis du Esperanto-klubojn. Mi tre volus korespondi kun esperantistoj tutmonde. Skribu al: Hassano NTAHONSIGAYE, B.P. 22 Rumonge, Burundio.

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĝoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

Kotiztabelo de UEA por 2007

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	95	57	34	190
Aŭstrio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Belgio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Brazilo/eŭro	5	12	29	17	10	58
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	70	170	425	270	160	850
Estonio/eŭro	5	12	31	20	12	62
Finnlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Francio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Germanio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Greklando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Hispanio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Islando/eŭro	9	23	57	34	20	114
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Japanio/eno	1400	3400	8500	5100	3000	17000
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	16	39	24	15	78
Nederlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	18	45	112	67	40	224
Pollando/zloto	20	50	122	76	46	244
Portugalo/eŭro	9	23	57	36	22	114
Rusio/eŭro	5	12	29	17	10	58
Slovakio/krono	230	570	1425	910	550	2850
Svedio/krono	80	210	530	340	200	1060
Svislando/franko	14	36	90	54	32	180
Usono/dolaro	11	27	67	40	24	134

TARIFA A/eŭro 6 16 39 23 14 78

TARIFA B/eŭro 5 12 29 17 10 58

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro kaj Slovenio laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Bulgario, Latvio, Litovio kaj Rumanio laŭ Estonio.

TARIFA A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MALLONGIGOJ:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJ-T – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

SA – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

Kto – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membreco)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO Tutmonde*)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oblo de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2006 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2006 (t. e. kiuj naskiĝis en 1976 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas aboni ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

– revuon *KONTAKTO*

– bultenon *TEJO Tutmonde* (oficiala organo de TEJO)

– akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso

– aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

